



**Universala Esperanto-Asocio (UEA)
Alparolo dum la 7-a sesio de
Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP),
Palaco de Nacioj, UN, Ĝenevo, 7-11 julio 2014 - je merkredo, 9-a de julio 2014.**

Tagorda punkto 3: Monda Konferenco pri Indiĝenaj Popoloj (WCIP)

Sinjoro Prezidanto, karaj reprezentantoj de indiĝenaj popoloj, karaj partoprenantoj, saluton!

Mia nomo estas [Stefano Keller](#), mi reprezentas Universalan Esperanto-Asociation (UEA), la mondorganizaĵon de la defendantoj de lingvaj rajtoj, kies membroj utiligas jam de 127 jaroj Esperanton, la lingvon justan kaj neŭtralan por la interetna komunikado, por tiel ebligi lingvan egalrajtecon de la interparolantoj.

Koncerne al la Projekto pri rezolucio da la ***Monda Konferenco pri Indiĝenaj Popoloj (WCIP)***,

konforme al la *Artikolo 13* de la *Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la rajtoj de indiĝenaj popoloj*,

ni alvokas pri inkludo en la Projekto pri rezolucio, aprobota en la altnivela kunsido de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj la 22-an de septembro 2014,

de rekomendoj favore al la konservado, subteno kaj utiligo de la gepatraj lingvoj de indiĝenaj popoloj.

Fakte, la esenco de tiu rezolucio troviĝas en la Artikolo 17, la agadplano, kaj temas pri la punktoj

17. (c) La rajto je komunikado ;

17. (d) La interkultureco de la sano kaj de la edukado ;

kaj

17. (i) La bona regado kaj la alireblo al la justico.

Al ĉiuj tiuj punktoj la uzo de iu **lingvo** estas bezonata, kaj la plej bona lingvo, kiun oni povas uzi estas **la gepatra lingvo**.

Mi dankas vin pro via atento.